# TAGIĜO

MONATA INFORM-BULTENO DE
ESPERANTO-ASOCIO DE BRASĪLIA

Edifīcio Goiās, s/603 - tel: 225-4761
Caixa Postal 04-0406
70000 - BRASĪLIA - DF - BRAZILO

JUNIO 1980 JUNIO 1980 JUNIO 1980 JUNIO

## LA REDAKTORO DE REVUO ESPERANTO VIZITIS BRASĪLIA

Sendita de la Estraro de UEA, S-ano SIMO MILOJEVIĈ, alvenis en nian urbon la 18an de majo en la kadro de la prepar-laboroj por la 66-a Universala Kongreso de Esperanto. Post vizito de la Kongresa Centro kaj de aliaj ejoj kie disvolviĝos niaj kongresaj manifestacioj, la gasto partoprenis kunsidon de LKK kaj havis interparolon kun ties prezidanto Senatano JOSÉ LINS DE ALBUQUERQUE. Antaŭ ol forflugu al Rio la 21an de majo, S-ano SIMO MILOJEVIĈ esprimis sian tre favoran impreson pri Brasīlia kiel kongresurbo kaj pri la stato de la preparoj de nia kongreso.

## EN JULIO LA RENDEVUO ESTOS EN SAN LUIS (ARGENTINO)

La urbestro de San Luis, Kolonelo Porrini, sendis personan inviton al prezidanto de UEA D-ro TONKIN por ke li ĉeestu la 1-an Tut-Amerikan Esperanto-Kongreson de la 12a ĝis la 15a de Julio 80. La urbo serioze sin preparas al tiu evento, kiu kunveniĝos esperantistojn el pluraj amerikaj landoj. Jam anonciĝis reprezentantoj el Ĉilio, Urugvajo, Venezuelo kaj kompreneble Brazilo, kies delegacio estos sendube la plej multenombra post la argentina! La lastaj informoj konfirmas, ke ne ekzistos problemoj pri senpaga loĝigado por gejunuloj kaj kongresanoj, kiuj tion deziros. Estos eble ankaŭ aliĝi je la alveno en San Luis kaj sekve, la membroj de nia asocio, kiuj ankoraŭ ne planis siajn juliajn feriojn estas kore invitataj partopreni la kongreson!

## DEPUTITO FREITAS NOBRE PREZENTIS NOVAN LEĜ-PROJEKTON PRI ESPERANTO

Nur lastatempe ni eksciis, ke Deputito FREITAS NOBRE, kiu jam plurfoje montris sian favoran sintenon por nia lingvo, prezentis la 20an de Septembro 1979 leĝproponon kiu tekstas jene en portugala lingvo:

PROJETO DE LEI

- Permite aos candidatos, em Concurso Vestibular, a opção na prova de lîngua estrangeira.

- O Congresso Nacional decreta:

ART. 1º - Aos candidatos à admissão aos cursos superiores, mediante classificação em Concurso Vestibular, fica assegurado o direito de opção, no que se refere à prova de lîngua estrangeira, dentre as permitidas pelo Conselho Federal de Educação como de prática educativa optativa.

ART. 2º - Esta Lei entrará em vigor na data de sua publicação, revogadas as disposições em contrário.

.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.

En la pravigo, kiu akompanas la projekton, oni klare akcentas, ke kutime oni oferas nur ekzamenojn en Angla kaj Franca, dum, ekzemple, Esperanto ne ricevas konvenan atenton. Sekve, se tiu projekto estos akceptita, la gestudentoj povos elekti aliajn lingvojn, inkluzive ESPERANTON, kaj tio signifos decidan paŝon por la disvastigo de la Internacia Lingvo en nia lando.

o o o o o

## VIZITO DE JANET BRUGOS YOUNG EL USONO

La 31-an de majo vizitis nian asocion S-ino Janet Brugos Young, anino de Esperanto Ligo por Nordameriko - ELNA, kiu raportis pri la movado en Usono kaj esploris ĉe LKK kaj ĉe la hoteloj, vojaĝagentejoj kelkajn eblecojn rilate al loĝado kaj ekskursoj por la usonaj samideanoj, kiuj venos al Brasília en 1981 por la 66a UK.

S-ino Young diris interalie, ke la Kongreso en Brazilo multe allogas ne nur usonajn esperantistojn sed ankaŭ la eŭropanojn, kiuj jam de nun ŝparas por 1981. Ŝi portis ankaŭ la bonvenigajn "voĉojn" de kelkaj LKK-anoj al la usonaj samideanoj de ELNA.

## TAGUATINGA ESPERANTO-KLUBO JAM HAVAS PROVIZORAN KUNVENEJON

Bone marŝas la laboro de Taguatinga Esperanto-Klubo - TEK. Danke al niaj du diligentaj samideanoj Ludimar Azevedo da Silva kaj Givanildo Ramos Costa, TEK jam provizore kunvenas ĉiusabate, je la 15:30 horo, en Centro de Ensino VI - 1º Grau - QNL 1 - Área Especial - Taguatinga - DF.

Ni invitas ĉiujn viziti la klubon, partopreni la kunvenojn, kaj ankaŭ skribi dankleteron al la Direktorino de tiu lernejo kiu tiamaniere helpas la esperanto-movadon en Brasília.

## PROGRAMO POR LA VENONTAJ SABATOJ

- 7an de Junio: Prelego de Enivaldo Alves Silva pri Francisco Waldomiro Lorenz.

  Gratuloj al la membroj, kiuj festos dum Junio la datrevenon de sia naskiĝo.
- 14an de Junio: Konversacia rondo.
- 18an de Junio: Renkontiĝo en la sidejo de BKE, je la 8:30 h, kun geedzoj HANNA kaj HEINZ SCHINDLER (gastoj de Bona Espero) kiuj donos freŝajn informojn pri la movado en Germanio.
- 21an de Junio: Gazetara Vespero.
- 28an de Junio: Informado de LKK pri la 66a UK

## KORESPONDPETO

Esperantista tre afabla kaj klera, grava juristo, deziras korespondi kun esperantisto loĝanta en BRASÍLIA. FILATELIO estas lia ĉefa intereso. Bonvolu skribi al:

D-RO HUGO FÔSCOLO
RUA ISAÍAS CORRÊA, 368 - 35774 - PARAOPEBA - MG

## BONA NOVAĴO DE BEJO

De Chapecó-SC, baldaŭe venos nova kaj freŝa IMPULSO al ĉiuj niaj karaj membroj.

## $PARU VIAN MONON KAJ $UKCE$IGU LA 66an UK-n !

$paru vian monon aliĝante tuj al la 66a UK. Ju pli da tempo vi perdo$ de$ pli da mono vi pago$, ĉar nia kruzejro pli kaj pli $envaloriĝas kaj po$t la 9a de aŭgu$to la kotizo plialtiĝo$.

Cetere, frua aliĝo multe helpo$ en la preparlaboroj!
Eĉ $e vi mem antaŭvida$ nepartoprenon en la Kongre$o, tamen aliĝu kaj $ukce$igu ĝin. Po$te vi perpo$te ricevo$ la kongre$an materialon di$donota dum la evento.

..............................................................................

$e vi $kribo$ al LKK kaj bezono$ re$pondon, bonvolu kun$endi afrankitan koverton.